Esperanto servu pacon!

# AKTUALE

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

La agadjaro 1976/77 N°11(44) Julio

## REZULTOJ DE LA SOCIALISMA KONKURADO INTER SEJMA-KLUBOJ DUM LA UNUA PERIODO DE LA AGADJARO 1976/77 (laŭ raportoj, venintaj antaŭ la 28-a de junio 1977)

### I. Ranglistoj laŭ kategorioj

Kategorio "A"

1. Poltava.....1931
2. Klaipeda....1526
3. Riga........1212
4. Krasnojarsk..706
5. Ufa..........607
6. Vilnius......470
7.-8. Barnaul.....0
   Leningrad...0

Kategorio "B"

1. Tjumenj...............563
2. Moskvo................539
3. Tiĥvin................418
4. Miass.................377
5. Doneck................337
6. Ĥarkov................305
7. Ivanovo...............266
8. Meĵdureĉensk..........256
9. Rostov-Don............229
10.-11. Ĥmelnickij........0
   Ustj-Kamenogorsk..0

Kategorio "C"

1. Kievo...........447
2. Zaporoĵje.......352
3. Ĉeljabinsk......309
4. Talgar..........302
5. Kaunas..........301
6. Kujbiŝev........270
7. Sizranj.........210
8.-9. Novosibirsk..162
   Salavat......162
10. Soĉi...........144
11. Novomoskovsk....65
12.-17. Kapsukas.....0
   Liepaja......0
   Maĥaĉkala....0
   Omsk.........0
   Sterlitamak..0
   Viljandi.....0

**Kluboj-kandidatoj**

1. Permj....................158
2. Magnitogorsk.............127
3. Petropavlovsk-Kamĉatskij..96
4. Siktivkar.................65
5.-10. Angarsk................0
Birsk.......................0
Kedainiai...................0
Tallinn.....................0
Tula........................0
Velikije Luki...............0

## II. Generala ranglisto

1. Poltava..................1931
2. Klaipeda.................1526
3. Riga.....................1212
4. Krasnojarsk...............706
5. Ufa.......................607
6. Tjumenj...................563
7. Moskvo....................539
8. Kievo.....................477
9. Vilnius...................470
10. Tiĥvin...................418
11. Miass....................377
12. Zaporoĵje................352
13. Doneck...................337
14. Ĉeljabinsk...............309
15. Ĥarkov...................305
16. Talgar...................302
17. Kaunas...................301
18. Kujbiŝev.................270
19. Ivanovo..................266
20. Meĵdureĉensk.............256
21. Rostov-Don...............229
22. Sizranj..................210
23.-24. Novosibirsk..........162
Salavat.....................162
25. Permj....................158
26. Soĉi.....................144
27. Magnitogorsk.............127
28. Petropavlovsk-Kamĉatskij..96
29.-30. Novomoskovsk..........65
Siktivkar....................65
31.-46. Angarsk...............0
Barnaul.......................0
Birsk.........................0
Ĥmelnickij....................0
Kapsukas......................0
Kedainiai.....................0
Leningrad.....................0
Liepaja.......................0
Maĥaĉkala.....................0
Omsk..........................0
Sterlitamak...................0
Tallinn.......................0
Tula..........................0
Ustj-Kamenogorsk..............0
Velikije Luki.................0
Viljandi......................0

P.Jegorovas, Sekretario de SEJM.

## PREPARI KOMENCANTOJN POR LA TENDARO

Du rolojn,laŭ mi, devas plenumi la Paroliga Periodo (PP) - ne nur la lingvan,sed ankaŭ la socian. La praktiko montras, ke malkontentas pri tendaro (certagrade ankaŭ pri si mem) tiuj, kiuj ene de la granda E-kolektivo sentas sin solece. Kulpas pri tio ne nur la malbona lingvokono. Ja sangvinulo, kolerikulo, eĉ balbutanta, sufiĉe rapide konatiĝas, ensocietiĝas. Kontraŭe, flegmulo aŭ melankoliulo bezonas alies atenton.

Kiel fari, ke jam de la unua tendara tago ĉiu havu por societado bonan konaton el alia urbo? Ni konsciu, ke Esperanto kiel lingvo ne sufiĉe interligas la komencantojn. Necesas aldonaj, helpaj ligoj, kiujn konstruas komunaj aktivecoj, travivaĵoj ktp. Do helpi povas kaj devas PP. Se PP-grupgvidanto sukcesos aranĝi ĉion tiel, ke la grupanoj bone ekkonu unu la alian (sciu personaĵojn, interesojn, kapablojn), post 4-5-taga komuna agado ĉiu havos por la tendaro bonan konaton, eĉ amikon.

Dum la tuta PP Esperanto sendube devas esti la ĉefa labora lingvo. Uzadon de naciaj lingvoj, precipe la laŭtan, necesas malrekomendi. La kazo, ke 1 komencanto havas 1 instruiston, estas unika. Reale estas unu gvidanto-instruisto por 8-10-persona grupo, kaj necesas trovi helpantojn en la grupo mem. Pli-malpli lingvokapablaj (ja ne ĉiuj same malbone parolas) respondecu pri certaj taskoj, ekzemple marŝvojo,tendumado (starigo kaj forpreno de tendoj), manĝaĵo, fajro ktp. Ili ricevu kaj notu por si la necesan specialan vortprovizon - poste ili uzos ĝin por alparoli la aliajn. Interalie, ajnan laboron kutime oni plenumas kolektive: 2-3 starigas tendojn, aliaj 2-3 zorgas pri fajro ktp. La grupgvidanto devas ĉeesti "ĉie": ion diri pri la laboro, montri, helpi, demandi - krei la lingvan atmosferon.

Ankaŭ dum la marŝado mem necesas instigi uzadon de Esperanto. Se iu ekbezonis iun esprimon aŭ vorton (ekzemple, nomon de iu arbo), kiun scias neniu, postulu, ke tion oni skribu en notlibreton - dum tendumado necesos konsultiĝi ĉe vortaroj. Des pli necesas utiligi por komuna konversaciado la ripozpaŭzojn (temo - io aktuala, ekzemple plano por morgaŭa tago). Taŭgas laŭvica solparolado pri kio ajn (ekzemple, ĉiu rakontas pri si mem - aliaj pridemandas). Ĉu necesas analizado de gramatikaj demandoj? Laŭ mi, ne - sufiĉas korektadi nur la plej gravajn erarojn. Se multaj faras la saman eraron - dum la tendumado eblas klarigi ĝin speciale.

Dum la marŝado oni renkontas lokulojn. Ĉu krokodili kun ili aŭ ŝajnigi nekomprenemajn "eksterlandanojn"? Laŭ mi, plej bone estas enkonduki postenon de tradukisto (plej bone parolanta en la grupo, se estas kelkaj tiaj - deĵoranta tradukisto). Ĉion, kion demandas lokulo, tiu tradukas en Esperanton, kaj inverse. Al la lokulo eblas klarigi, ke estas sovetiaj esperantistoj, kiuj laŭ la reguloj (metodiko) de la lernado ne rajtas dum la lernotagoj paroli ne en Esperanto.

Pri kontaktoj kun aliaj PP-grupoj: prefere ili ne estu longaj - tio ne helpas la laboron.

Mi nenion diris pri rolo de gitaristo en la grupo. Ni ne devas ĝin troigi: unuiĝas ne gitaro, sed kanto. En malgranda grupo eblas bone kanti ĉe vespera fajro ankaŭ sen gitaro.

PP- Paroliga Periodo, tiel ĝis nun oni titolis la antaŭtendaraja tagojn. Sed paroligi la komencantojn necesas ankaŭ dumtendare. Estus tial pli precize uzi la titolon "Prepara Periodo". Bonan veteron kaj sukceson al ĝi!

V.Ŝilas (Vilnius).

KOMENTO DE LA REDAKTORO. La titolo "Prepara Periodo", proponata de la aŭtoro,ne estas trafa, ĉar la vorto "prepara" estas tro ĝenerala (ni rememoru la preparajn brigadojn antaŭ SEJT-16 kaj 17).

## BELARTAJ KONKURSOJ "ORIENTO-77"

La Prepara Komitato de la 19-a Orient-Sovetia Esperantista Junulara Tendaro anoncas, ke dum OrSEJT-19 okazos Belartaj Konkursoj "Oriento-77", dediĉitaj al la 60-jara jubileo de la Granda Oktobro. Ĉiuj esperantistoj estas invitataj subteni la aranĝon. Oni povas partopreni la Konkursojn ĉeeste aŭ foreste. La forestaj partoprenantoj devas ĝis la 1-a de aŭgusto sendi la konkursaĵojn (tekstojn kaj surbendigojn) laŭ la adreso: 456323 Miass-23 Ĉeljabinskoj obl., a/k 25, Miassa E-klubo, Novikova Ludmila Leonidovna.

S p e c o j d e k o n k u r s o j

I. Originala prozo: partoprenas originalaj prozaj verkoj, nenie publikigitaj.

II. Originala poezio: partoprenas originalaj versaĵoj, nenie publikigitaj.

III. Originalaj kantotekstoj (nenie publikigitaj).

IV. Originala melodio por libere elektita E-teksto.

V. Tradukita prozo: partoprenas tradukoj de la legendo de P.Baĵov "Solneĉnij kamenj" - "A"-8(41), p. 84-87.

VI. Tradukita poezio: partoprenas tradukitaj versaĵoj, nenie publikigitaj.

VII. Tradukitaj kantotekstoj (nenie publikigitaj).

VIII. Plenumo de versaĵoj (de kiuj ajn aŭtoroj).

IX. Plenumo de kantoj (sole aŭ grupe).

X. Konkurso de fotaĵoj: partoprenas fotaĵoj pri E-temo, ne malpli ol 13x18 cm.

XI. Konkurso de lumbildoj: partoprenas serioj de lumbildoj pri E-temo.

Prepara Komitato de OrSEJT-19.

## INFORMAS ILEI-SEKCIO

La 14-an - 24-an de julio 1977 en Luksemburgo okazos la XI-a Internacia konferenco de ILEI. La ĉeftemo de la konferenco estos: "La estonteco de Eŭropo sen komuna lingvo", subtitolo: "Homaj rajtoj kaj interkompreniĝo". La konferencon partoprenos ne nur la estroj de la landaj ILEI-sekcioj, sed ankaŭ aliaj membroj. La programo de la konferenco antaŭvidas krom laboraj kunsidoj ankaŭ interesajn ekskursojn, vizitojn al edukaj instancoj, universitato kaj lernejoj.

Sovetunia sekcio de Internacia Ligo de E-Instruistoj nun okaziĝas kontaktojn kun estraro de la E-Komisiono ĉe SSOD por pli oficialigi sian agadon. Pri tio sekvos alia informo. Venis letero de la ILEI-prezidanto s-ro Sonnabend kun promeso abonigi la "Internacian Pedagogian Revuon" ekde nun pli regule. Do ekde 1978 ĉiuj membroj de la ILEI-sekcio rajtos ricevi tiun revuon kaj tial la aliĝkotizo kun la abonpago por IPR sumiĝos al kvin rubloj.

Kaj fine. Al ĉiuj ILEI-membroj estas grava peto: ne skribi leterojn al superaj sovetaj instancoj kun diversaj demandoj pri ILEI-agado. Tion oni povas fari nur post konsultado kun la estraro de la sekcio. Alie estus nur grava malhelpo al nia laboro.

N.Starodubcev, Sekretario de Sovetia ILEI-sekcio.

## EL ERAROJ NI PRENU UTILON

Proksimiĝas la aŭtuno - naskiĝtempo de novaj E-rondetoj. Ĉiu pli-malpli sperta gvidanto scias, ke parto de la studrondoj finiĝas sensukcese, ĉar multaj lernantoj pro diversaj kaŭzoj foriras el la

rondoj. Okazas diabla situacio: la gvidanto volas scii ĝustan kaŭzon de ilia foriro, sed nome tio ne eblas, ĉar la homoj malaperas sen raporto...

Certe, plej ĝeneralajn kialojn ni scias. Sed ekzistas multaj tre subtilaj nuancoj, pri kiuj ni povas nur konjekti. Ekzemple, estas aprobita kaj ĝusta konsilo: por firmigi la kolektivon - kantu ĥore. Aliflanke, ekzemple mi spertis, ke post mallerta, nekvalifika kantigado ĵuj seriozaj kamaradoj jam ne aperis dum novaj lecionoj. Jen ankoraŭ: la lernantoj kun intereso atendas la menditajn lernolibrojn, legaĵojn, kaj - okazas - oni ricevas primitive fabrikitajn, sed sufiĉe multekostajn "esperantaĵojn". Similaj okazoj ankaŭ reduktas la kvanton de kursanoj.

Espereble, la sociologia fako enketigos, analizos kaj publikigos ĉi-teman materialon plej komplete. Ni devas ne nur lerni laŭ niaj sukcesoj, sed ankaŭ preni maksimuman utilon el niaj eraroj.

Tre grava demando - niaj interrilatoj kun oficialaj instancoj. Fojfoje junaj samideanoj kvazaŭ forgesas, ke antaŭ ĉio ili estas civitanoj, komsomolanoj, internaciistoj, kaj nur poste - esperantistoj. Se sur la unuan lokon starigi nian esperantecon, do la oficialuloj certe ne komprenas tion. Ekzistas nemultaj ideaj kontraŭuloj de nia movado - precipe estas indiferentaj, neinformitaj homoj. Kaj plejparte de ni, de nia konduto dependas, ĉu ili estos simpatiantoj aŭ malhelpantoj por nia agado.

V.Ĉernov (Kaluga).

## STUDENTA KONFERENCO

Esperanto-rondeto ĉe Kieva Konservatorio funkcias kiel unu el diversaj rondetoj de la Konservatoria Studenta Scienca Societo. Komence de majo 1977 la Societo organizis grandan sciencan studentan konferencon. La programo de la konferenco enhavis diverstemajn raportojn, inter kiuj - tri pri Esperanto: "Kio estas Esperanto?" - T.Smirnova; "Esperanto servas pacon" (pri MEM) - L.Nikolajeva; "V. Jeroŝenko - esperantisto, muzikisto, poeto, sociaganto" - I.Bilim.

Ĉiuj E-raportoj elvokis vivan intereson de la publiko. Tuj aperis novaj adeptoj de Esperanto, kiuj decidis lerni la internacian lingvon. Do nun ni organizas novan E-rondeton por komencantoj.

Doc. J.Majburova.

## EN LVOVA E-KLUBO "PRIMAVERO"

La 12-an de junio 1977 lvova E-klubo "Primavero" solene festis la faman datrevenon - la aperon de la Unua Libro de Esperanto. La oficiala parto kaj la koncerto okazis en aŭlo de Lvova Domo de Sciencistoj.

Pri la Unua Libro kaj la nuna stato de Esperanto rakontis la klubestro A.Koroleviĉ. Prelegon "Problemoj de interlingvistiko kaj Esperanto" faris inĝenierino A.Balanik. La oficiala parto de la vespero finiĝis per enmanigo de atestoj pri sukcesa fino de E-kurso al novaj geesperantistoj.

Sufiĉe riĉa estis la arta parto de la vespero (13 programeroj). Ĉe la klubo estas organizitaj junulina voĉa E-ensemblo sub gvido de O.Kopistjanska kaj moderna estrada elektra orkestreto sub gvido de I.Bijan.

La vesperon vizitis 100 personoj. Okaze de la grava dato estis aperigita murgazeto "Primavera trembito".

Prof. A.Koroleviĉ.

EKSPOZICIO OKAZE DE RUĜA OKTOBRO

Honore al la 60-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio la geesperantistoj el Karl-Marx-Stadt (GDR) intencas aranĝi internacian letervesperon kune kun migranta ekspozicio. Ni ĝentile petas ĉiujn gekamaradojn en la tuta mondo, helpi al ni per la sendado de salutskribaĵoj, kartoj, laŭeble kun Lenin-poŝtmarkoj aŭ poŝtmarkoj koncernantaj la revolucion de 1917 mem. Por la ekspozicio migranta ni bezonas ĉefe Lenin-afiŝojn kaj afiŝojn pri ĉiuj aliaj eminentaj gvidantoj de la klaskonscia laboristaro kaj personoj. Ni volonte akceptos ĉiun alian specialan materialon pri la revolucio, ekonomia konstruado ktp. Niaj aranĝaĵoj okazos sub la devizo: Amikeco kun la granda Soveta Unio!

Krom la popularigo de Esperanto ni celas plifirmigi kaj pliprofundigi la sentojn kaj pensojn rilate la internacian solidarecon kaj proletaran internaciismon.

Respondo estas garantiota! Al ĉiuj ni tre dankas antaŭe! Kiu deziras ricevi nian broŝuron pri la historio de la iama Laborista Esperanto-Movado en niaj urbo kaj distrikto, bonvolu mencii tion speciale. Ĝi estas germanlingva broŝuro.

Karaj gekamaradoj! Ni konsideru, ke la "Ruĝa Oktobro" fakte estis la komenciĝo de vere nova epoko por la homaro de la mondo. Tial la "Ruĝa Oktobro" estos eksterordinara jubileo!

Bonvolu sendi ĉion laŭ jena adreso: Alfred Müller, 90 Karl-Marx-Stadt, Karl-Liebknecht-Str. 47, Germana Demokratia Respubliko.

(el "der esperantist" N-2/1977)

MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO - MOZAIKO

LA REDAKCIO RICEVIS

la bultenon "Scienco sen limoj" N-10(12). En ĝi troveblas: artikolo de A.Gonĉarov "Nova etapo en la ST-fako", alvoko de la ĉeĥaj kolegoj "Por internacia scienca E-bulteno!", artikolo de L.Medvedev pri prof. Armand (pli ampleksan varianton vidu en "A"-9, p. 98-99), fragmentoj el leteroj, novaĵoj de E-lingva scienco kaj tekniko.

FRAZLIBRO POR MOSKVA OLIMPIADO?

Ĝia eldono dependas de tio, ĉu la Organiza Komitato de Olimpiado-80 (Moskvo, ul. Gorkogo 22) ricevos sufiĉan kvanton da petoj, precipe de sportistoj, el eksterlando. Do instigu viajn korespondantojn. La skribontoj al la Organiza Komitato povas mencii pri la sperto de Montrealo, kiam tia frazlibro estis eldonita en Esperanto, angla kaj franca lingvoj. Nun oni petu la E-rusan varianton.

LA E-RUBRIKO EN "SOVETSKAJA MOLODJOJ"

eble baldaŭ reaperos, kiel informas A.Kalninŝ el Riga. Do sendu interesajn kontribuaĵojn al la redakcio: Riga, Dzirnavu 59.

LA KOMITATO DE SEJM DEZIRAS AL ĈIUJ SEJM-KLUBOJ, AL LA SUBTENANTOJ, AL NIA AKTIVULARO NUNA KAJ ESTONTA - SUKCESAN ESPERANTISTAN SOMERON, UTILAN LABORON KAJ BONAN RIPOZON EN NIAJ TENDAROJ KAJ KONFERENCO! ĜIS LA REVIDO EN MIASS KAJ POLTAVA!

---

La informilo estas uzenda nur enlande! Presigita 5.7.77.
La numerojn 1(34) - 11(44) redaktis V.Areloviĉ: 121019 Moskvo d/v.